

Esperanto

EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA



Ĉion por la Redaktoro sendu al:
TOM FRASER,
2 Lady Helen Street,
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:
Fino **ANNE EYRE,**
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,
Hamilton, Lanarkshire.

Nia Aloro antaŭ la publiko:-

Unu el la plej trafaj, gustatempaj pri-Esperantaj leteroj kiun ni iam legis, aperis en "Radio Times" de Aprilo 9a. La skribinto atentigis pri la lingva malfacilo ĉe Eŭroptelevida Kant-Konkurso, la ĝeno auskulti al unu parolado kvinfoje en la kvin uzitaj lingvoj kaj la konfeso de la Brita interpretisto, ke almenaŭ dufoje li ne komprenis kion firis la parolanto. La skribinto proponis, ke oni aperigu en "Radio Times" kaj ekvivalentaj eksterlandaj gazetoj plurajn el la plej oftuzataj frazoj, en Esperanto kiun nur unu parolvoĉo uzu.

Se ni diras, ke la letero estis subskribita "Helen Hood, Edinburgo 5" kaj ke, en tiu distrikto loĝas Prezidentoparo - nu per sagulo sufiĉas aludo!

La Garberry-Kongres-Komitato utiligis la Kongreson propagande jam antaŭ la okazo. Ili sendis resumon de la parolado de S-ro Kennedy al ĉiu eduk-inŝtanco en Skotlando kaj ĝeneralan antaŭinformon pri la Kongreso al 50 Skotaj ĵurnaloj. Ne eblas taksii la efikon de la unua iniciativo - iuj edukistoj estas tiel farcigitaj de edukadoj, ke ili ne havas spacon por eĉ unu nova ideo - sed rilate la duan, almenaŭ la Glasgova tagĵurnalo "Evening Citizen" presis je 23/5/64 intervjon kun S-ro Kennedy pri ĉi ties Esperanta vivo. Sekve de tio ĝi ricevis almenaŭ unu leteron pri nia lingvo.

Raportoj pri la Kongreso aperis en kelkaj ĵurnaloj, kiujn ni konas, sed ni ne povas vidi ĉiujn do ni tre petas niajn legantojn (ne la aliajn sed nur vin kiu nun legas ĉi tiujn vortojn) eltondu iun tian raporton legitan kaj sendu al ni ĉe la redaktora adreso.

DANKON.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

"Objektiva Vivkoncepto" subtitolita "Bazaj Konsideroj" estas 27-paĝa broŝuro eldonita kaj havebla de Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96 Kopenhago, F, Danlando. Verkinto, Ib Schleicher.

Demando ofte farita de intelligentaj infanoj ĵenas:-

"Panjo, de kie mi venis?"

Tiaj demandoj estas bazo por la Rezona Teologio kaj ĉi tiu libro kvankam ĝi ne sin tiel nomas, pritraktas ĝuste ĉi tion. Multege da inko, spiro kaj pensado uzig-is-as-os kontraŭ tiaj problemoj, fare de filozofoj (la Skoto Hume estas eminenta ekzemplo), poetoj kaj teologoj, do la Martinus skolo laboras en tradicia kampo de homa kulturo. La stilo de traktado memorigas pri geometrio; la aŭtoro komencas per aksiomoj kaj konstruas sur ilin deduktajaron kies ĉiu ondo apogigas sur la subaj kaj apogas la supran. Tamen, laŭ ni, tre baldaŭ la "pruvoj" estas neperfektaj kaj kondukas al nuraj asertoj. Preskaŭ ĉiuj akceptas la unuan aksiomon antaŭmetitan, "La vivo, la universo kaj ni mem ekzistas," (kvankam iuj metafizikoj nur kun gravaj rezervoj,) kaj la aliajn fruajn deklarojn. Sed kiam ni legas (paĝo 17) ke, "Novo ne povas sperti movon" ni emas kurmeti la "boksgantojn". En ĉi tiu (efektive en ĉia) filozofiado, oni preskaŭ ĉiam puŝigas pli aŭ malpli frue, kontraŭ semantikaj problemoj. Kion celas diri Schleicher, ekzemple per "sperti" kaj "movo"? Ĉu "lerni-per-sperti" aŭ sangigi-de-influo" kaj "movat(aĵ)o" aŭ "movant(aĵ)o" aŭ la abstrakta eĉo "movo"? Oni povus dediĉi paĝon al tiuj difinoj. De tiu punkto la neargumentitaj "asertoj", "misjuĝoj" kaj "fantazaĵoj" svarmas, ne pro stulteco de la aŭtoro sed pro la naturo de la temo kaj la eteco de la broŝuro.

dz/91. daŭrigo sur paĝo C)
A.

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 55

Somero 1964

Jarabono, 3s (5 Steloj)

NIA KVINDEK-NAŬA

-

CARBERRY TOWER

Amikeco, instruo, ĝuo, inspiro - ĉion el ĉi tiuj ni trovis. Ĉe nia Jar-Kongreso 59a ĉe Carberry Tower, Midlothian, inter vendred-vespero kaj dimanĉo, la 22a ĝis la 24a de Majo.

Aligis 57 gesamideanoj kaj efektive ĉeestis 52. La grandeco de la ĉambroj bone taŭgis por tiu nombro kaj se la dancantoj lomete interkunpuŝigis dum iuj el la dancoj dum la distra vespero sabate, tio nur pli gajigis agrable neformalan okazon.

Zumis aĉetumuloj kaj ŝvebemuloj super la librotablo vendred-vespere kaj se ili ne tute nudigis ĝin, almenaŭ ili aĉetis ĝis £10 da libroj kaj ceteraĵoj - ne malbona komerco en la nuna radie kaj televide sufokata tempo. Zumis ankaŭ la babilado inter la renkontiĝantoj kun aparta intereso ĉirkaŭ Ges-oj Middlemast kaj S-ro Kennedy specoj de re-aperantoj kiujn ĉiu ĝojis re-vidi. Poste ni aŭdis sonbende la voĉojn de anoj de Hispana familio kies estiĝo komenciĝis ĉe internacia Esperanta kongreso kiam renkontiĝis kaj tuĵ enamiĝis du ge-skoltoj, Estonino kaj Hispano, meze de Eŭropo. Nek la distroj de paco, nek la imperativoj de militoj povis rompi la perverdstelan ligon inter tiu duo, do, meze de la postmilita tumulto la esperantista kolombino transflugis sian Rubikonon de Estonujo al Iberio por trovi sian vivfeliĉon, feliĉon kiun ankaŭ ni partoprenis, tiun kongresvesperon kiam ni aŭdis, ne nur la voĉojn de la paro, sed tiujn de la gefiloj. Esperanto ne nur vivas sed vivigas!

Oni povus timi, ke parolado, "Raraj Esperantaj Libroj", kiu liveriĝis sabatmatene, odorus iom de putretiĝanta ledο sed la infekta entuziasmo laŭ kiu S-anō Mackay traktis sian temon rapide forblovis ian tian timon. Videble, li estis multe laborinta inter la arkivoj

de la Edinburga Societo kaj la konstato estigata en ni pri kiel niaj pioniroj sin dediĉis al vartado de la unuaj literaturaj fajreroj de la nun neestingebla Esperanta bibliografia torĉego, vekis viglan intereson, respekton kaj inspiron.

Eĉ pli intensa sento tia ebrilis en ni okaze de la Diservo dimanĉe, kiam la parolado temis pri la longaj, persistaj laboroj kiujn Britaj pioniroj kaj aparte S-ro John Mabon Warden, faris por ebligi la eldonon de la kompleta Biblio, kiu, kiel sciata, estis dediĉita je la 18a Universala Kongreso en Edinburgo, en 1926. Kun tia tradicio de celkonscia strebado subtenanta nin, ni, "en laboro paca ne laciĝos"!

Krom la enprogramaj eventoj, ni ĝuis almenaŭ du aldonitajn, memor-riĉigajn farojn:-

S-ano Jack Casey montris sian filmon kronikantan la pli lumajn momentojn de sia vivo en la Vraca Kongreso de TEJO kaj posta ferio ĉe Primoŝten, Jugoslavio. Teknika malfacilaĵo ĉe la projekciilo malheligis la unuan parton de la filmo sed baldaŭ tio estis venkita kaj ni povis bani nin en la brila sunlumo de Bulgario kaj Jugoslavio kaj preskaŭ gustumi la trinkaĵojn necesigitajn de la varmo, pere de la vizaĝesprimoj de la el- kaj en-versantoj! Nervovibriga estis tiu kinovidkapto kie ni vidis unu el la junaj esperantistoj naĝi, kuraĝe se ne saĝe, rekte ĝis la faŭko de 15 metrojn alta akvofalo kaj lasi sin fali kiel ŝaŭmero en la riverprofundon. Se ni ĝuste perceptis, ŝajnas, ke dum tiu esperanta ferio S-ano Casey perdis ion, ion tre valoran; kiu estas, se ne oro, io kio rimigas kun tiu vorto. Feliĉe, ni kredas, ke iu ĉarma Slavino ĝin trovis kaj zorge konservis por li.

Se Midlothian ne disponas pri vizitindaj Sfinkso kaj Piramidoj, ĝi konstruas por si eĉ pli grandajn kaj utilajn imponaĵojn inter kiuj Cockenzie-generatorejo. Tien pluraj el ni veturis kaj sub la profesie sperta gvidado de Kongresano Robert Fraser, ekhavis ampleksan ideon pri la estonta funkciado de tiu materia koloso. Ĝi en-glutos ĉiutage 10,000 tunojn de karbo (antaŭdigestita ĝis subtila pulvoro) liverante per tio 1,200,000 kilovatojn - sed plenfunkcie vivos nur 6 jarojn! Ĉu vi ne povas aŭdi la Sfinkson ridi? Kaj supozeble ĉi tiu daŭros ridaĉi eĉ kiam oni klarigis, ke ĉi tiun

nelongan plenvivon kaŭzos, ne eluziĝo de la maŝinaro sed la planita konstruo de plua eĉ pli granda, pli precize, duoble pli, ĉe Longanĉe apud Kincardine. Ju pli granda kaj nova estas elektrofarejo, des pli ekonomie ĝi produktas elektron, do oni ĉiam uzas la plej nove konstruitan por provizi la "bazan" kvanton da bezonata elektro. Ĝi nome, funkcias plene tagnokte kaj la malpli novaj, funkcias aldone kiam la "baza" kvanto ne sufiĉas la pli altajn bezonojn. Ĉe la konstruado de Cockenzie laboras nuntempe ĉirkaŭ 800 homoj sed tiu nombro multe kreskos.

Post la kaftrinkado dimanĉe, akurate je la 11.30 ni reiris en la prelegejon por aŭskulti al parolado de S-ano Kennedy pri temo en kiu li ege kompetentas - "Esperanto en la Lernejoj". Ne kaŝante la diversajn malhelpojn kiuj baras la vojon por nia lingvo en la lernejojn, li tamen donis esperigan bildon pri jamaj atingoj kaj estontaj ebloj. Li sciigis, ke oni instruas Esperanton en 533 institutoj de 32 landoj (el kiuj 28 en Britujo). Li mensciis la elstaran faradon de S-ro Norman Williams, de Denton, kiu ne nur instruas jam de multaj jaroj, sed aranĝas aŭtobusekskurson tra Eŭropo ĉiujare por siaj Esperanto-lernantoj, utiligante por tio la delegitan servon de U.E.A. Tiel montriĝas la universaleco de nia lingvo - ne nur en unu lando ĝi uziĝas, sed ĉie. Li klarigis pri la "geonkla" servo, aranĝo per kiu individuaj infanoj kiuj bezonas helpon, ricevas tion korespondante de iu bonvola plenkreskula esperantisto. Tia rekta atento multe kuraĝigas la infanojn. Li ankaŭ priskribis la unikan gazeton, pli ĝuste serion de gazetoj, "Grajnoj en Vento". Grupoj de lernejoj kie Esperanto estas instruataj kunlaboras en la kompilo de komuna lernejogazeto. Kontribuaĵoj estas sendataj al centro en Svisujo, kie oni multobligas ilin kaj redistribuas al la lernejoj de la grupo. Ekzistas jam kvin el tiuj grupoj kaj sesa ĵus fondiĝis.

"Estas nenio malordinare, en la ekzisto de lerneja gazeto sed tiaj gazetoj, la komunaj produktaĵoj de lernejoj en landoj tiel diversaj kiel Peruo, Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio, Norvegujo kaj Japanujo, devas nepre esti unikaj." deklaris nia preleginto.

Por ĉiu faro estas horo, diras la proverbo kaj la zorgaj Kongresorganizantoj ne forgesis, ke eĉ por homoj plej seriozaj ne manku tempoj amuzaj. Do sabatvesperon ili asignis al distra vespero sub la bonhumora, lerta gvido de S-ano Neil Hay. La programo ampleksis

skeĉojn (el la plumo de S-ro Mackay), kantojn (S-roj Jack Casey kaj Robert Fraser kun la helpo de ĉiu en la ĉambro) kaj kompreneble dancadon. Aŭdiĝis ankaŭ la alvoko al amikeco de la karmemora Edinburga poeto, Robert Fergusson per lia "The Daft Days" en la traduko de S-ano W. Auld, kaj la traduko de "The Laird o' Cockpen" kiel ĝi staras en la printempa numero de ĉi tiu bulteno, transformiĝis el pasiva paperinko en vivantan kantadon. Ludoj ankaŭ ne mankis kaj post tetrinko la pli juna ono de la Kongreso daŭris kanti kaj sin amuzi ĝis horo kiun la programo ne konis.

Neniu plendis pro la ellaso de 'busekskurso. Persone ni tre aprobis tiun ellason. Kie ni trovas pli belajn perspektivojn ol en la bieno de Carberry? Ĉu la tereno ne estas saturita je historio; eĉ kun du memorŝtonoj rilate al Mario, Reĝino de la Skotoj? Krome, kio estas preferinde, sidadi, pasiva portato, sidante apud nur unu samideano sensanĝe dum duona tago, aŭ libere flugeti de unu al alia, pli funde koniĝante kaj intersanĝante spertojn, ideojn, ŝercojn? Kaj, grava por bona Skoto, ŝparante la monpagon de meĥanika transporto! Pli indis, ekzemple tiu dimanĉposttagmeza piedmigrado laŭlonge de la rivero Esk ol la plej luksa 'busekskurso. Ni do, danku la organizon komitaton (S-ino Black, Ge-soj Mackay, S-ro Calder kaj helpantoj, ne nur pro la faritaĵoj sed la nefaritaĵoj.

Mensciinda estas la sentruda kompetenteco de la stabo ĉe Carberry, sub la direkto de F-ino J. Mathers, kiu ĉiel faciligis la funkciadon de la Kongreso kaj agrabligis nian restadeton.

Perfekta kongreso lasas ne nur feliĉajn memorojn sed donas plifortigitan deziron antaŭenigi la Aferon, do kion vi faros inter nun kaj la 60a? La 60a okazos kie? Nu, en la Konsilantara Kunveno oni parolis pri Stirlingo aŭ ie alia en la mezo de Skotlando sed posta flustro atentigis, ke ni havas anojn ankaŭ en Falkirk kiu eble proponos, ke en sia grava urbo ili povos aranĝi taŭgan okazon. Tuj kiam decido estos prenita la sekretario de la Glasgova Societo kiu akceptis ĝeneralan respondecon por tiu en-okcidenta kongreso informos nin. Dumtempe, ni ĉiu fosu nian sulkon. Bonŝviton!

DU SONEtoj DE WILLIAM SHAKESPEARE

Soneto 116

Al paraj mensoj, kiuj fianĉigas,
mi ne malhelpu; am' ne estas tio,
kio, vidante sangon, mem sangigas,
aŭ klinas sin laŭ kapricul-manio.

Ho ne, ĝi estas fiksa floŝbarelo,
kiu tempeston frontas sensancela;
por ĉiu vaga bark' ĝi estas stelo,
kun alt' konata, sed valor' mistera;

tempo ne regas amon, kvankam ruĝaj
lipoj kaj yangoj sub la falco falas;
am' ne sangigas pro la horoj fugaj,
sed ĝis la rando de la mort' ne palas.

Se ĉio ĉi erara estas, sciu:
ne vekis mi, kaj amis jam neniu.

Soneto 146

Povra anim', vi peka karnokerno,
dupo de l' ribelantoj ĉirkaŭrompaj,
kial vi velkas, srumpas, en l'interno,
farbante viajn murojn koste pompaj?

Kial ĉi koston, dum tre kurta luo,
por domo kadukiĝa vi elpagas?
Ĉu yermoj, heredontoj de ĉi troo,
mangos la ŝelon? Tien korpo vagas?

Do vivu vi je konto de l'seryanto,
per ĝia velko via stok' pliigu;
acetu diepokojn skorikvanto;
nutriĝu ene, la ekster' ne riĉu -

tiel la homnutrata mort' vin nutros,
kaj post mortmorto, oni plu ne putros.

(Tradukitaj de William Auld)

(Parafrazoj sur paĝo B)

PAROLADO DE LA KONGRES-PREZIDANTO

Sinjorino HELEN B. MACKAY

Gesinjoroj,

Ni volus ke ĉi tia kunveno okazu en Usher Hall, Edinburgo, kun ĉiuj seĝoj, de la planko ĝis la plafono, plenaj de esperantistoj. Eble tiu revo efektiviĝos nun tagon en la estonteco, sed nun estas utile rerigardi al la pasinta jaro por konstati kian progreson la movado faris. Ni emas ĵugi nian aferon per la prospero aŭ malprospero de nia loka klubo aŭ societo, sed ni devas memori, ke Esperanto estas tutmonda afero, kaj ĝia prospero devas esti taksata per pli vasta rigardo.

Estas neniam dubo pri tio, ke Esperanto ja progresas. Necesas nur ĵeti rigardon en unu el la internaciaj gazetoj pro tion konstati. Plej rimarkinda estas la kresko de intereso en la malproksima oriento - en Japanujo, Ĉinujo kaj Vietnamio, ekzemple. Pli kaj pli da libroj el tiuj landoj aperas en la internacia lingvo. Aparte okulfrapaj estas la albumoj kaj rakontlibroj riĉe ilustritaj kiuj venis el Ĉinujo. Plua atesto pri la antaŭeniĝo de Esperanto en tiu lando trovigas en la anonco, ke oni enkondukis en la Fakon pri Alilandaj Lingvoj, bazan intensan kurson pri Esperanto.

En Japanujo la Universala Kongreso en 1965 estos kulmina punkto pro la penoj de la samideanoj de tiu lando. Tre bedaŭrinde estas, ke ilia movado (efektive la monda movado) ricevis fortan baton en la nuna monato. "Heroldo" en sia numero de 16a de Majo informas nin pri la morto de Profesoro Yagi, la Prezidanto de U.E.A.

En nia lando multaj homoj kutimas pensi, ke la angla lingvo firme fiksighis kie ajn ĝi metis siajn radikojn; pro tio ili flankenpuŝas Esperanton, opiniante, ke estas nur afero de tempopaso ĝis la angla lingvo fariĝos universala. Ni legis, tamen, ke en Cejlono, jam de la 31a de decembro, lasten jaron, la angla lingvo ne plu havas oficialan akcepton tie.

Ne ofte ni legas pri Esperanto en Ĉinujo, sed antaŭ kelkaj monatoj venis informo, ke la unua broŝuro pri Esperanto aperis en la Bengala lingvo.

Pli proksime - en Eŭropo - laŭ "The British Esperantist" la Kultura Ministro de Hungarujo multe pligrandigis la eblojn per instruado de Esperanto en la lernejoj tie.

Ankaŭ en la universitatoj Esperanto faras progreson. S-ro Markarian raportas, ke nun estas Esperantaj katedroj en kvin universitatoj kaj ke nia lingvo estas instruata oficiale en dek unu aliaj, kaj neoficiale en ses aliaj.

Inter junuloj Esperanto faras progreson, kvankam ne tiel rapidan kiel oni volus raportti. Sed montriĝis lastatempe inter la vicoj de T.E.J.O. forta plivivigo kaj T.E.A. disponas al ili apartan kolonon en sia revuo "Esperanto".

En nia propra lando - en Edinburgo - juna studento ĉe la Universitato antaŭ nelonge parolis al la "Cosmopolitan Club" (studenta klubo) pri Esperanto, kaj li esperas starigi Esperantan grupon ĉe la universitato. Kelkaj aliaj membroj de la Edinburga Societo paroladis al "Youth Fellowships" en la urbo, kaj S-ro Casey montris filmojn je pluraj okazoj. La plano estas sekvida de aliaj grupoj.

En la kampo de Radio kaj Televido, ni aŭdis la paroladojn de S-ro Markarian kaj S-ro Hamilton, kaj tri leteroj pri Esperanto estis legitaj antaŭ nelonge en "Any Answers". Sed ankoraŭ ni ofte trovas, ke homoj, kiuj okupas postenojn de aŭtoritato kaj influo malestimas Esperanton. "Ĝi estas artefarita", ili diras; ĝi estas tro simpla; ĝi ne havas fonon". Sed ni Esperantistoj pruvis, ke ĝi funkcias!! Eble la horo ne estas malproksima, kiam, dum oficialuloj malsparas tempon kun interpretistoj kaj multlingvaj samtempaj tradukoj, la ordinara homoj de la mondo estos babilantaj libere kunc, per Esperanto.

Ĉi tiu estas okazo por memori kun danko ĉiujn dediĉitajn homojn (kelkaj el ili estas ĉi tie kun ni hodiaŭ) kiuj kviete laboras jaron post jaro, ne atendante aŭ dezirante ian rekompencan krom vidi la sukceson de la movado. En ĉiu lando en la mondo estas tiaj esperantistoj, ofte malricaj homoj, kiuj elspezas sian liberan tempon kaj monon por instrui, por organizi klubojn, por serĉi novajn membrojn. Multaj el ili mortis ne vidinte plensukcesan rezulton, sed se ni daŭrigos en la sama maniero ilia laboro ne estos vana.

Mi vere kredas, ke D-ro Zamenhof estis inspirata de Dio, kiam li kreis Esperanton - same kiel Handel kiam li verkis "Messiah" - kaj ke ni obeas la volon de Dio, kiam ni laboras por mondfrateco per Esperanto. Se tio estas vera, ĉiom lia potenco kaj helpo estas je nia dispono, se ni nur petas ĝin. Neniam ni pensu, ke ĉio dependas sole de niaj malfortaj penoj.

Mi ne povas pli bone fini, ol per ripeto de la vortoj de D-ro Zamenhof per kiuj li finas sian "Aldonon al la Dua Libro" kiun vi vidis hodiaŭ matene:-

"Sed unu aferon oni ne devas forgesi: ni devas esti atentemaj kaj konstantaj; ni ne devas atendi, ke aliaj nin kuragigu per sia ekzemplo, kaj ni ne devas perdi la kuragon kaj malvarmigi, se ni tiun ekzemplon ne vidas, - ni devas per nia propra laboro doni ekzemplon al aliaj; kaj se en la unua tempo neniu al ni aligos, aŭ se oni ek ridos je ni, ni devas kredi, ke pli aŭ malpli frue la ridantoj venos al ni. Ni iru kurage antaŭen, ĉar nia afero estas honesta kaj utila!

Tiu ĉi libreto estos la lasta vorto, kiun mi elparolas en rolo de aŭtoro. De tiu ĉi tago la estonteco de l'lingvo internacia ne estas jam pli multe en miaj manoj, ol en la manoj de ĉia alia amiko de la sankta ideo. Ni devas nun ĉiuj egale labori, ĉiu laŭ siaj fortoj, ĉiu el vi povas nun fari por nia afero tiom same kiel mi, kaj multaj el vi povas fari multe pli multe ol mi, ĉar mi estas sen kapitaloj, kaj el mia tempo, okupita de laboro por ĉiutaga pano, mi povas oferi al la amata afero nur tre malgrandan parton. Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de la lingvo internacia alportos al ĝi ĉe la centan parton de l'

moralaj kaj materialaj oferoj, kiujn mi al ĝi alportis tra dekdu jaroj ĝis hodiaŭ, tiam la afero iros bonege kaj venos al la celo post la plej mallonga tempo. NI LABORU KAJ ESPERU!"

* * * * *

NOVAJ LIBROJ

IMPERATIVOJ DE LA VIVO. Hubert Rohden, 1963. 154 paĝoj.
140m oblc 19Cm. Papero bindita. Eldonis kaj havebla de:
Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Caixa Postal 3677-ZC-00.
Rio de Janeiro, Brazilo.
Prezo 1 dolaro (13.4 Steloj) aŭ interŝanĝe kontraŭ nova(j) libro(j).

D-ro Huberto Rohden estas Brazila filozofo, antaŭe pastro, kiu verkis kvardekon da libroj en la portugala lingvo pri filozofio kaj religio kun titoloj kiel "La Prediko sur la Monto". "La Triumfo de la Vivo sur la Morto", "La Vojo de la Felico", "En Komunio kun Dio", k.t.p.

La subtitolo de "Imperativoj de la Vivo" donas pli klaran ideon pri ĝia enhavo; ĝi estas "gvidlibro por homoj dezirantaj la gloran libecon de la filoj de Dio". La libro komenciĝas per prego kaj finiĝas per la ĉiutaga preĝo de la aŭtoro, prego por gvido al la lumo bonfara de Dio. Lau D-ro Huberto Rohden la homo estas arestito en la karcero de sia korpo kaj konsideras tiun arestejon sia hejmo, sia palaco. Sed la homo ne bezonas resti en karcero. Li aŭdos voĉon interne de sia esto mem kaj la ferbariloj orkoloraj de lia palacarestejo fandigos kiel vakso en la sunradio. Tiam li estos en la ciela regno unuigita kun la ĉiela Patro.

Rohden kredas je la libera volo de la homo. "Vi mem estas la aŭtoro de via destino." .. "Via destino estas en viaj pensoj." Li rekomendas, ke oni prenu spiritan banon ĉiutage konsistantan el tri-dek minutoj de preĝado.

La traduko de la verko estas bonege farita, la stilo klara, kaj la presado bona. Sendube estas personoj kiuj profitus de la legado de ĉi tiu libro.

Olive Robotham.

TRI FABELOJ DE HANS ANDERSON.

Eldonejo Koko, kiu jam provizas Esperantujojn per bona traduko de "La Marvirinto" nun eldonos en Aŭgusto, pluan per "La Novaj Vestoj de la Imperiestro", "Hans Fusulo" kaj "Estas Tute Certo", en unu kovrilo. Ankaŭ ĉi tiujn tradukis Ib. Schleicher. La volumo estos belege ilustrita per 24 tutpaĝaj kolorbildoj, de kiuj la eldonejo sendis al ni unu, kiuj perfekte respegulas la humorespritan enhavon de la fabeloj. La tuta libro ampleksos 48 paĝojn, 21 x 27 cm., bindita. Prezo nur 30 steloj (15s). Havebla siatempe de B.E.A. kaj cetere.

Por renkonti la nunan veteranon ni devas direkti niajn paŝojn pli norde ol antaŭe, al Fochabers en Moray. Tie vivas de post sia emeritigo unu el la apogbastionoj de la Edinburga Societo S-ro John P. W. Murray. Ĉe nia intervjuo, li preferis, ne aritmetike respondi al individuaj demandoj, sed ilue esprimi siajn pensojn, migrante en sian memorgardenon kaj plektante por ni bukedon de floroj el tie. Jen li parolas al ni:-

Hazarde mi aĉetis Esperantan ŝlosilon el librobudo en Londona stacidomo kiam mi loĝis en tiu urbego. Tiu ĉi propagandilo interesiĝis min kaj elvokis deziron lerni la lingvon sed ĝis mia translokiĝo al Edinburgo en 1911 taŭga okazo ne prezentigis. Sub la lerta instruado de S-ro Senior en la Edinburga Grupejo - je tiu tempo ĉambro 26, Synod Hall - kaj per intensa studado mi povis legi kaj korespondi tutfacile post ses monatoj, sed tre heziteme parolis. Malrapide parolpovo kreskis. Kia kontrasto al mia malgranda scio de la latina kaj franca lingvoj kiuj konsumis horojn en la lernejo kun profito tre malmulta! En tiu-ĉi periodo mi avide legis du amuzajn kaj facile kompreneblajn librojn tre taŭgaj por komencantoj - TRI ANGLOJ ALILANDE kaj KOMPATINDA KLEM - de Sheffielda-aŭtoro S-ro Merchant kiun mi havis la plezuron renkonti en Edinburgo. Ŝajne tiuj libroj ne plu estas aĉeteblaj. Kiel progresinto en kurso gvidata de F-ro Tait mi studis la KRESTOMATIO'n de D-ro Zamenhof.

Kiel impresis min mia unua universala kongreso, okazinta en Edinburgo en 1926! Elstara en la memoro estas la diservo en katedralo Sta. Giles kiam, ricevita el la manoj de S-ro Warden, la Sankta Biblio en Esperanto estis dediĉita. Je tiu okazo mi trovis, ke mi okupis sidlokon inter samideanoj el Japanujo kaj Rumanujo! Poste mi partoprenis universalajn kongresojn en Oksfordo, Stokholmo, Vieno, Londono kaj Berno.

Survoje al Stokholmo mi pasigis kelkajn tagojn en Oslo. Forlāsante la hotelon, al demando "Ĉu vi deziras esperantistan aŭtomobiliston?" mi respondis "Jes." La veturigisto kaj mi interparolis tute libere kvankam li ne sciis la anglan kaj mi estis nescianta pri la Norvega. En Stokholmo (1934) impresis min la granda nombro da gejunuloj el diversaj landoj kiuj interparolis tiel flue kaj kvazaŭ laŭnature en vagonaroj, aŭtobusoj, k.c. Bone organizita kongreso kaj tre ĝuinda! La edzino deziris aĉeti Svedan ĉapelon, kaj enirinte magazemon por tiu celo mi rimarkis anoncon "Se vi deziras paroli

Esperanton, premu tiun ĉi sonorigilon." Tion mi faris kaj tuj apcris vendisto salutante en Esperanto. Ĉapelo estis aĉetita en Esperanto! En Vieno (1936) surstrata vendisto de ĵurnaloj, vidante mian insignon kaj nian necertecon, ĝentile proponis helpon. Li gvidis al taŭga aŭtobuso, diris al la kondukto nian destinion, kaj al mi la precizan veturpagon. Je tiu tempo en Aŭstrujo aferoj estis tre malfacilaj kaj mi rimarkis, ke multaj ĝentilaj personoj devis sin okupi je surstrata vendado. Ankaŭ en Vieno mi alparolis policanon kiu portis Esperantan insignon kaj li direktis nin precize al nia hotelo. Eble pro tio, ke universalaj kongresoj ne okazis dum la mondmilito mi neniam renkontis nian fonditon D-ro Zamenhof kiu mortis en 1917, sed en Edinburgo en 1926 mi havis la plezuron saluti kaj paroli kun du el liaj filinoj.

Kvankam nun esperantista izolulo, mi sentas min loĝanto en Esperantujo kaj daŭrigas membrecon de la Edinburga Societo, B.E.A., U.E.A. kaj K.E.L.I. Dum jaroj sekretario de la Edinburga Societo, kaj ĝis antaŭnelonge delegito de U.E.A. en Fochabers, Esperanto donis al mi multe da plezuro. Kelkfoje oni aŭdas ke la angla farigos la internacia lingvo sed ŝajnas al mi, ke tia propono sendube vekos ĵaluzaĵojn naciajn. Ni ne aldonu al internaciaj suspektoj, jam tro multaj, sed persiste praktiku nian neŭtralan lingvon ĝis la fina venko.

La samideanoj jam menciitaj - S-ro Warden, S-ino Senior kaj F-ino Tait - kaj multaj aliaj estimataj pioniroj en Edinburgo forpasis, sed al tiuj miaj konatuloj en Edinburgo kiuj daŭrigas sian tre valoran laboron mi kaptas la okazon sendi tre varmajn salutojn, aparte al S-ro Robert Mackay, prezidanto, kies entuziasmon kaj laboremon en nia movado mi ĉiam admiras.

* * * * *

Veterano John Murray havas nun 83 jarojn. Do li plene meritas la ripozon, tiel de Esperanto laboro kiel de la profesia, ĉu ne? Tamen, li NE nenion faras por la Afero. Lastatempe li starigis valoran kontakton kun sia distrikta ĵurnalo "The Northern Scot" al kiu li kontribuas informon pri Esperanto. Tiaj admirinduloj longe vivu ankoraŭ, ĉar la mondo bezonas ilin. Ke ĉiu laboradu por Esperanto kiel li!

PARAFRAZOJ POR LA SONETO-TRADUKOJ (paĝo 2)

116 Mi ne malhelpu la unuiĝon de simpatiaj mensoj. Amo daŭras ami, ĉe se la amato sangigas. Amo ne kaprice sangigas; tute ne, ĝi estas kiel fiksita buo kiu ne cedas al stormo aŭ lasas sinforportigi de la ondoj. Por ĉiu vojaĝanta sipo, ĝi estas kiel stelo kies alteco estas precize konata sed kun aliaj nekonataj valoraj ecoj. Amo ne estas superregata de tempo kaj kvankam la belaj trajtoj de amanto aŭ amato perdiĝas laŭ la forpaso de tempo la amo mem ne sangigas sed restas ĝis la morto. Se ĉio kion mi diris, ne estas vera, mi neniam ien verkis kaj neniu iam amis.

146 (En ĉi tiu poemo Shespir traktas la individuon kiel du-partan estaĵon - la karnan, morteblan korpon kaj la spiritan parton kiu povus brumpi per submetigo al la vantaĵ postuloj de sia materia kunulo, la karno, aŭ evoluigi kaj riĉigi per subigo kaj ekspluato de tiu materiala "skoriamaso". La poeto alparolas precipe tiun unuan (spiritan) parton, sed ankaŭ la duan (korpan) parton.)

Kompatinda animo, vi kiu estas la pekema spirito de, kaj trompigas de, via ĉirkaŭmedio (la korpo) kial vi forkonsumas vin per ornamado de via ekstera logejo? Kial vi oferas vin tiel altkoste dum la mallonga tempo donita al vi por vivi? Ĉu vermoj kiuj mangos la eksterajn ankaŭ ekposedos la spiriton kiun ili ne rajtas? Vi kiu estas kvanto da cindriga karno, acetu per ĝi (tio estas, uzu vian dumkorpan vivon por atingi) diecan vivodaŭron; la spirita interno nutrigu koste de la eksterajo. Tiel vi devigos la morton, kiu vivas, konsumante la homojn, nutri vin kaj post morto de la Morto (la Relevigo?) putrigo ne plu okazos.

~~XX~~

A N O N C O

Magnetofona sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistoj, foto-kino kaj magnetofonamatoroj (ILEF) anoncas, ke estas komen- cita la kunmetado de listo de ĉiuj geesperantistoj, kiuj emas korespondi kaj interŝanĝi kulturajn programojn per sonbandoj (voĉpondi). Ĉiuj intereseemuloj estas petataj sin turni al la respondeculo de ILEF por Magnetofona sekcio, inĝeniero Petro Poliŝĉuk, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15, Taŝkent-52, U.S.S.R. Postelspezojn bonvolu rekompenci per unu-du ilustritaj poŝtkartoj kun la vidaĵoj de via urbo.

S-ano David Withey, 21 Brookfield Ave. Waterloo, Liverpool, 22 vokas kompetentan esp-tajpiston transkribi liajn gazetablonojn honorarie. Helpemul(in)oj skribu al li ĉe la supra adreso.

LA DEK-OKA STUDRONDO ĈE STRATHKINNESS okazis de la 17a ĝis la 20a de April, 1964.

Je vendreda vespero la ĉeestantoj interkonatiĝis. Sabate, la Prezidanto por la tago estis elektita - estis S-ro Cairns. Je la deka okazis "Notinda Homo el Fremda Lando." Ĉiuj parolis tre interese pri diversaj homoj, ekzemple, Albert Schweitzer, kaj Marie Curie. Mi tre ĝuis tiun parton de la programe. Poste ni iris por promeno.

Posttagmeze kelkaj el ni iris al St. Andrews. Je la sesa, la enhavo de la Podebrady-Kajero estis distribuita kaj diskutita. Poste okazis la amuzvespero. Ni dancis kaj kantis; ankaŭ ludigis du teatraĵetoj. Ĉiuj tre ĝuis la vesperon.

La Prezidanto por Dimanĉo estis S-ino Goodfellow. Je la naŭa tridek ni ĉeestis Diservon. F-ino Wanless gvidis ĝin. "Vivanta Muzeo" okazis je la deka. Ĉiu kunportis interesajn kaj parolis pri ĝi. Posttagmeze okazis la aferkunsido. Kelkaj el la ĉeestantoj donis siajn opiniojn pri la programoj. Oni diskutis la programon de la sekvonta jaro. Post la temango ni iris hejmen. Mi kaj miaj du fratinoj tre ĝuis la Studrondon ĉe Strathkinness kaj ni certe reiros en la venonta jaro.

Jean Muirhead.

Nia raportanto estas unu el la tri fratinoj kiuj ornamis per sia ĉeesto kaj gojigis per sia aktivo, en nia Strathkinness-Studrondo. Ŝi estas tute juna, ĵus antaŭ tiu aĝo post kiu farigas ĝentile ne demandi pri la preciza jarnombro.

* * * * *

(daŭrigo de recenzo de pago A)

La intenco, tutklare, estas allogi la atenton de legontoj kaj doni stimulon enkondukon al la temo, kredante ke, 'apetito venos dum la mango'. Klaras ankaŭ, ke Schleicher esperas indiki, ke studado de ĉi tiu filozofio povas alporti gravan mensan utilon al inteligentuloj kiuj, mankante firman koncepton de la viv-kialo - kielo - kialo - tielo, nun sentas dubon, konfuzon kaj malfelicon. En tiuj celoj li tre sukcesis. La argumentoj estas bele prezentitaj kun placaj skizoj, violetkoloraj alineoj, bildoj, foto kaj artreproduktaĵoj. Se ni ĝuste komprenas la frazon ĉesube de pago 5, kiu tekstas "Kaj ... pri Martinus ... rakontas, ke li estas tiel grava pensulo ...", devus teksti "... tia grava pensulo...". Entute, al homoj kiuj satas deturni la pensojn iam for de la materialismo, amuzo, malĝojo kaj - jes, eĉ de Esperanto! ni forto rekomendas ĉi tiun volumeton. Plua rekomendilo (aparte grava al Skotoj!) ĝi estas senpage havebla dum stoko restas. Rapidu!!

X-X

El la bilanco de nia Federacio kiel montrita de la Kasistino, F-ino Tyre, de la Kongreskunsido en Carberry: La neta kredito sumas £66:4:10: ankoraŭ malkresko, grandparte rezultinte de Bultendoficitoj. Ni luktas ĉesigi tiun malkreskon. Helpu per abonigo por viaj amikoj kaj akurata pago de abonado!



C.